**PAIVA NETTO SKRIBAS** “Ne timu la krizon. Ĝi forpasos, vi restos”

www.bonavolo.com

# BONA VOLO

La Revuo de la Ekumena Spiritualeco • JARO 23 • N-ro 64




## Homaj Rajtoj

Kio ŝanĝiĝis sesdek jarojn poste?

SPECIALE

# Infano Estonteco en la Estanteco!

- Fortaleza (Brazilo) kunvenigas esperantistojn de la tuta mondo favore al la universala lingvo
- Legio de Bona Volo disvastigas sian mesaĝon de ekumena spiritualeco ĉe la evento

## Kunlaborante kun LBV, vi helpas konstrui pli bonan mondon!




**BANKO HSBC**
Bankokodo: 0343
Kontnumero:
63275-24

**BANKO SANTANDER**
Bankokodo: 0239
Kontnumero:
13002754-6

## Helpu vi LBV-on ampleksigi ĝian agadon!

**CENTRA SIDEJO**: Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • São Paulo • Brasil • CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500 • www.lbv.org • www.boavontade.com / **LBV DE ARGENTINO**: Av. Boedo, 1942 • Boedo • Buenos Aires CP C1239AAW • Tel.: (+5411) 4925-5000 • www.lbv.org.ar / **LBV DE BOLIVIO**: Calle Asunta Bozo, 520 • Zona Alto Obrajes (sector A) • Casilla de Correo 5951 • Tel.: (+5912) 273-3759 • www.lbv.org.bo / **LBV DE USONO**: 20 Calumet Street, 1st floor • Newark/NJ • Zip Code 07105 • Tel.: (+1973) 344-5338 • www.legionofgoodwill.org / **LBV DE PARAGVAJO**: Calle Curupayty, 1452 c/ Mayor Bullo Cerro Corá • Ciudad de Lambaré • Tel.: (+59521) 921-100/03 • www.lbv.org.py / **LBV DE PORTUGALIO**: Rua Alexandre Herculano, 355 • Freguesia da Sé • Porto • CP 4000-055 • Tel.: (+35122) 208-6494 • www.lbv.pt / **LBV De URUGVAJO**: Av. Agraciada, 2328 • Aguada • Montevideo • CP 11800 • Tel.: (+5982) 924-2790 • www.lbv.org.uy

ELEVAÇÃO

BONA VOLO

JARO 23• N-ro 64

BONA VOLO estas kvarmonata publikigaĵo de IBV-oj, eldonita de Eldonejo Elevação. Ĝi estas registrita per n-ro 18166, la 16-an/3/2006, sur la libro "B" de la 9-a Notario pri Registro de Biloj kaj Dokumentoj de San-Paŭlo, Brazilo.

DIREKTORO KAJ ĈEFELDONISTO: Francisco Periotto MTE/DRTE/RJ 19.916 JP

**ĜENERALAJ KUNORDIGANTOJ:** Gerdeilson Botelho kaj Rodrigo de Oliveira

**SKIPO DE ELDONEJO ELEVAÇÃO–PORTUGALLINGVE:** Adriane Schirmer, Cida Linares, Felipe Duarte, Jefferson Rodrigues, Jéssica Botelho, Leila Marco, Letícia Rio, Maria Aparecida da Silva, Neuza Alves, Raquel Bertolin, Rodrigo Oliveira, Rosana Bertolin, Natália Lombardi, Walter Periotto kaj Wanderly Albieri.

**SKIPO DE ELDONEJO ELEVAÇÃO–ESPERANTLINGVE:** Maria Aparecida da Silva, José Roberto Tenório da Silva, Paulo César Pereira, Felipe Duarte kaj Jéssica Botelho.

**GRAFIKA PROJEKTO:** Helen Winkler

**KOVRILO:** Jonny César

**KOMPOSTADO:** Felipe Tonin

**PRESADO:** Mundial Artes Gráficas

**ĈIUJ RAJTOJ DE TIU ĈI ELDONO REZERVITAJ DE EDITORA ELEVAÇÃO:** Rua Doraci, 90 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brazilo • CEP 01134-050 • Tel.: (+55 11) 3358-6919/ Fax: (+55 11) 3358-6882 • www.bonavolo.com

## Pripenso de BONA VOLO

**"En la krizaj momentoj forĝiĝas la grandaj karakteroj kaj aperas la plej multpovaj nacioj."**

Mesaĝo elprenita de la libro *Meditadoj kaj Pensoj – Dialektiko de Bona Volo*, verkita de Paiva Netto.

# Traktato pri la Nova Ordono de Jesuo

Instruis la Ekumena Kristo: *"Novan Ordonon Mi donas al vi: Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Nur per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos Amon unu al alia. (...) Jen estas mia Ordono: ke vi amu unu alian tiel same, kiel Mi vin amas. Neniu havas Amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian Vivon por siaj amikoj. Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion Mi al vi ordonas. Kaj Mi tion ordonas: vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias, kion lia sinjoro faras; sed Mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion, kion Mi lernis de mia Patro, Mi sciigis al vi. Vi ne elektis min, sed Mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu bonan frukton, kaj ke via frukto daŭru; por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo. Tion Mi ordonas al vi, ke vi amu unu la alian, kiel Mi amas vin. (...) Kiel la Patro min amas, tiel Mi ankaŭ vin amas. Restadu en mia Amo".*

(Aranĝita de Paiva Netto, akorde kun la Evangelio de la Kristo de Dio, laŭ Johano, 13: 34 kaj 35; 15: 12 ĝis 17 kaj 9).

**4** Mesaĝo de Paiva Netto
Ne timu la krizon. Ĝi forpasos, vi restos

**8** Leteroj, retpoŝtoj kaj registroj
Esperantistoj parolas pri LBV


**11** Speciale
LBV en Brazila Kongreso de Esperanto

**16** Unuiĝintaj Nacioj/Unesco – Parizo
61-a Konferenco de NRO-oj de DPI

**25** Unuiĝintaj Nacioj/Novjorko
Kunsido de Supera Instanco 2008

**31** Soldatetoj de Dio
Feliĉpromesoj de Jesuo













"Kio estas krizo, se ne oportuna okazo kun aspekto de malfeliĉo? Baroj estas premioj de Dio al nia inteligenteco, stimulo al tiu, kiu ne rezignas pri agado, kiu pravigas la vivon, kaj donas al ĝi koloron. Tiam oni plej bone povas utiligi sian talenton."

# Ne timu la krizon. Ĝi forpasos, vi restos.



José de Paiva Netto, ĵurnalisto, radikronikisto, verkisto, komponisto kaj poeto. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), efektiva membro de Brazila Asocio de Komunikado (ABI), de Internacia, Brazila Asocio de Komunikado (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj) kaj de International Federation of Journalists (IFJ).

João Preda

En Brazilo, ĉies atentoj turniĝas al la sekvoj de la nuna monda krizo. Favore aŭ malfavore, politikistoj, ekonomikistoj, entreprenistoj, analizistoj opiniadas pri rimedoj, kiuj povas bremsi aŭ stimuli konsumadon, aŭ ion ajn, kio evitu, laŭ ilia pensmaniero, sociajn perturbojn enlande.

Malgraŭ ĉia maltrankvilo, ni sciu utiligi ĉi tiun momenton por atingi ekvilibron, sen kio malfacile ni atingos sukceson. Kio estas krizo, se ne oportuna okazo kun aspekto de malfeliĉo? Baroj estas premioj de Dio al nia inteligenteco, stimulo al tiu, kiu ne rezignas pri agado, kiu pravigas la vivon, kaj donas al ĝi koloron. Tiam oni plej bone povas utiligi sian talenton. Ĉia renverso enhavas en si mem solvon, tiel instruas la antikva kaj saĝa orienta kulturo. Plendado nenion konstruas. Ni devas kontraŭbatali malentuziasmon, sen trompado al la homamaso. Homoj kaj nacioj, kiam ili fariĝas senesperaj, sendefende falas aŭ stariĝas ribele.

## Saĝeco de Konfuceo

Necesas revadi, helpi por ia pli digna mondo. *Pari passu,* oni havu la piedojn firme sur la grundo, tio estas, oni estu certaj, ke dezirataj ŝanĝoj ne alvenas sen efektiva penado. Ni meditu pri ĉi tiu perla saĝa penso de **Konfuceo**: *"Se ni sufiĉe antaŭe starigas*


Konfuceo

*nian konduton en la vivo, tiam nin neniam atakos afliktiĝo. Se ni antaŭe scias, kiuj estas niaj devoj, tiam ni facile plenumos ilin".* Simpla planado.


Cetere, la filozofion de tiu respektata ĉina majstro oni konsideras kiel unu el la fundamentoj de la rimarkinda impulso, kiu aperigis "aziajn tigrojn", kiuj nuntempe estas ankaŭ skuataj de la tutmonda streĉo. Okaze de renkontoj inter ekonomie gravaj landoj en la mondo – komprenebla pelataj de instinkta klopodo por pluvivado – serĉe de sanaj rimedoj por alfronti la krizon, estas tamen nepre necese, ke racio plektiĝu kun spirito de solidareco (io ankoraŭ malofta ĉe tiaj internaciaj rilatoj), ĉar la koro pli emas ĉiam aŭdi, ke frateco estas efektive la fundamento de dialogo. Ili iam komprenos, ke sen amo, aŭ kiu ajn nomo en la "teknologia lingvo" oni uzos, oni nepre trovos tiujn grandajn suferojn antaŭdiritajn de Jesuo en Lia Evangelio, laŭ **Mateo**, en la tuta ĉapitro 24. Krome, la vivo estas ia konstanta sinpravigo ĉe tribunalo de la konscienco, de kiu neniu povas forkuri, eĉ se ĉio restas por ĉiam kaŝita.



## Energia sinteno

Nerenversebla sinteno estas oportuna respondo antaŭ ĉia krizo. (...) Ni ne forgesu, ke – kiam ni restadas ĉe Dio – tiam eĉ malfeliĉo montriĝas kiel favora okazo por kreado.

Ekzistas tiuj, kiuj pasigas jarojn atendante plej malbonajn okazojn. Nur tio sufiĉas por malsanigi homon. Kial ne celi la plej bonan kaj klopodi labori por tio? **Thomas Jefferson** (1743-1826) memorigas nin pri ĉi tiu frapanta realaĵo: *"Kiom kostis al ni malbonaĵoj, kiuj neniam okazis!"*. Kaj krome ekzistas rusa proverbo, kiu konsilas: *"Kredu Dion, sed plu naĝadu al la marbordo"*.


Thomas Jefferson

Mia solidara penso al ĉiuj, popolanoj kaj registoj, kiuj alfrontas malfacilaĵojn, ne mallevas la standardon kaj honoras siajn familiojn kaj la patrujon, kaj tiel postvivas pli laboremaj kaj pli fortaj. Nia lando daŭre klopodas sin defendi de la tempesto, kiu nuntempe malkvietigas aliajn popolojn. Bona batalo liveras al ni valoran okazon por progreso.

Jesuo tamen ne krizas. Ni do petegu Lian protekton.


paivanetto@uol.com.br
www.bonavolo.com

"Nerenversebla sinteno estas oportuna respondo antaŭ ĉia krizo. (...) Ni ne forgesu, ke – kiam ni restadas ĉe Dio – tiam eĉ malfeliĉo montriĝas kiel favora okazo por kreado."

# TEMPLO DE BONA VOLO


## estas aklamita de la Popolo kiel unu el la Sep Mirindaĵoj de Braziljo/DF - Brazilo















Aklamita de la Popolo kiel unu el la Sep Mirindaĵoj de Braziljo, en la brazila Federacia Distrikto, la Templo de Bona Volo (TBV) ekde sia fondo en 21/10/1989, fare de Paiva Netto, jam akceptis pli ol 18 milionojn da pilgrimantoj kaj turistoj. Laŭ oficialaj datumoj de Sekretariejo pri Ekonomia kaj Turisma Disvolviĝo de la Federacia Distrikto (SDET), ĝi estas la monumento plej vizitata en la ĉefurbo de Brazilo. Apud ParlaMundi kaj sia administra sidejo, la Templo de Paco kompletigas la Ekumenan Ensemblon de Legio de Bona Volo.

**Vizitu ĝin! SGAS 915 – Lotes 75/76**

**Informoj: (+5561) 3245-1070 • www.tbv.com.br**





# Legu mesaĝojn pri Ekumena Spiritualeco per www.bonavolo.com

## Esperantistoj el la tuta mondo skribas al LBV

Legio de Bona Volo povas kalkuli je mia dispono kiam ajn. La riĉa mesaĝo de nia Frato Paiva Netto estas disvastiginda. Kun ĝojo mi anoncas al vi ke ni estas konstruanta lernejon kie estos instruota Esperanton. Do, mi jam promesas ke la loko estos ankaŭ disponebla por la disvastigo de la mesaĝo de Paiva Netto. **Kaptis mian atenton legi pri Legio de Bona Volo tiel ke nuntempe mi havas en mia komputero 127 paĝojn pri skribaĵoj de Legio de Bona Volo france kaj esperante. Riĉaj, evidentaj kaj disvastigendaj skribaĵoj. Legio de Bona Volo meritas esti starigita en ĉiuj landoj por helpi Homojn vivi pli frate. Ĉiumonate dum la kunveno de nia asocio mi ĉiam prelegas pri la skribaĵoj de Paiva Netto.** Miaj kunasocianoj mirigas pri la profundeco de la prelego. La ideo de Ekumenismo ĉiam kaptas mian kapon. Do, mi estas je via dispono por la prezenco de Legio de Bona Volo en Kinshaso. ***(Jean Bosco Malanda, Kongo)***

Mi tutkore kaj volonte akceptas kunlabori kun LBV pri nia komuna agado (esperanto) por ke paco, saneco, prospereco kaj interhelpo unun la aliaj regu en la tuta mondo. ***(Ali Mze Mihidjahi, Komoroj)***

Certe mi helpos vin rilate disvastigadon de viaj tre bonaj mesaĝoj de LBV. Gratulon pro la bonega revuo BONA VOLO! ***(Allex Bandeira, Brazilo)***

Bela revuo. La agado de LBV estas admirinda. Daŭrigu ĝin ĝis la fino kaj Jesuo redonos al vi ĉiuj. ***(Ladislau Afonso, Brazilo)***

Legi la revuon BONA VOLO tre plaĉis min. Mi gratulas por la agado en Legio de Bona Volo! ***(Ana Maria Molera, Hispanio)***

Karaj, Estimataj kaj Bonkoraj! Antaŭ momento mi ricevis de leterportisto vian afablan Mesaĝo-Leteron kun la Revuo de la Ekumena Spiritualeco, BONA VOLO. Kore kaj sincere mi salutas vin. ***(Antonio Jerzy Walaszek, Pollando)***

Koran dankon pro la belega numero 63 de revuo BONA VOLO. Kun aparta plezuro mi legis la raporton pri la 92-a Universala Kongreso en Jokohamo, kiun ankaŭ mi partoprenis. Mi deziras prosperon al la agado de LBV. ***(Boris Kolker, Usono)***

Esperanto-Federacio de Niĝerio (EFEN) kredas pri interfratiĝo kaj laboras por tiucelo. Vi scias ke en Niĝerio vivas pli ol 250 aŭ ĉu 450 etnoj. Ofte estas miskomprenoj. Ni bezonas tiajn agadojn de LBV kaj ni pretas kunlabori. ***(Prince Henry Oguinye, Niĝerio)***



Estas mirinde surprize, ke vi havas kapablojn por starigi kaj elteni tiel grandan movadon kaj eldonadi revuon tiel belforman. ***(Hiroshi Nagata, Japanio)***

BONA VOLO estas vere belege, riĉe farita kaj mi gratulas al ĝiaj kreintoj por tio! Mi transdonos la bultenojn en nia klubejo. Mi deziras al vi grandajn sukcesojn en LBV! ***(Magdalena Feifičová, Slovakio)***

Ege koran dankon por la tre bela kaj interesa revuo, pro la filozofio de Legio de Bona Volo. Per via informo memorigas min antaŭ jam 20 jaroj kiam mi aŭdis pri tiu bonega ideologio dum mia partopreno en la UK en Rotterdamo 1988. Mi tre interesiĝis pri la mesaĝo. ***(Mramba Simba, Tanzanio)***

La agado de LBV estas cetere plene hom-ama kaj tio ligas nin. Vian per-esperantan laboradon mi alte taksas. ***(Robert Moerbeek, Nederlando)***

Mi trovas la revuon bela kaj konsentas kun ĉiuj klopodoj antaŭenigi




pacon kaj harmonion inter la Homaro. Mi kopiis vian mesaĝon al la esperantistoj de Irlando. Amike, ***(Seán Ó Riain, Belgio)***

Pro neebleco publikigi ĉiujn retpoŝtajn mesaĝojn kaj leterojn senditajn al la gvidanto de LBV kaj al revuo BONA VOLO, ni dankas, per ĉi tiu eldono, kelkajn el ili kiel maniero reprezenti ĉiujn:

**Ŝandor Monostori** (Aŭstralio) – **Antônio Carlos de Martins, Evandro Caboclo, Henrique Alan, Jair Salles, Jairo Augusto dos Santos, José Roberto de Albuquerque, José Roberto Tenório, José Saraiva Matos, Leonardo Ramalho, Silvio Marcio Camargo Bruno** (Brazilo) – **Jérémie Sabiyumva** (Burundo) – **Li Sang** (Ĉinio) – **Claude Gacond, Renée Triolle, Roger Degrelle** (Francio) – **Serio Boschin** (Italio) – **Hori Yasuo, Matumoto Akira** (Japanio) – **Mära Timermane** (Latvio) – **Andreo Marszalkowski** (Pollando).

**Sendu ankaŭ vian retpoŝton al LBV**

**esperanto@bonavolo.com**

## Pola ĵurnalisto kaj filmraportisto lanĉas libron

Okaze de la 93-a Universala Kongreso de Esperanto en Nederlando, la pola ĵurnalisto kaj filmraportisto **Roman Dobrzy ski** lanĉis libron titolitan *Bona Espero — Idealo kaj Realo.* En unu el la ĉapitroj de la libro Roman laŭdegas la ekumenan proponon de LBV-Piramido, kaj krome reliefigas la historion de la Institucio: *"Mi observis en la Templo de Bona Volo en Brazilo interesan scenon. La kupolon de la Templo kronas dudekkilograma kvarckristalo. Sunradioj trapasas ĝin kaj fokusiĝas sur la planko. Tie interpremas sin homamaso: nudaj piedoj, supren etenditaj manoj, fermitaj okuloj. (...) Legio de Bona Volo* (Legião da Boa Vontade) *estas brazila, bonfara asocio kun ekumenaj celoj, fondita en 1950, kiu laŭstatute utiligas Esperanton."*

Tre oportune, ĉe proksimiĝo de la 19-a fonddatreveno de la Templo de Paco (la 21-an de oktobro 2008), la ĵurnalisto sendis leteron, per kiu li rememoras la filmraporton, kiun li registris okaze de la inaŭguroceremonio de la monumento: *"Kia Koincido! Freŝdate mi rigardis miajn malnovajn filmojn kaj haltis ĉe tiu kun la titolo 'POTENCO DE BONA VOLO'. Ĉu estis hazardo? Eble ne! Mi spektis la filmon kaj kortuŝe rememoris la inaŭguron de la Templo de Bona Volo en la jaro 1989. Tio estis granda travivaĵo por mi. Mi vidis amason da Legianoj; en iliaj okuloj brilis larmoj de emocio kaj ĝojo pro la belega konstruaĵo kun granda kristalo sur la pinto. Ankoraŭ viglas en mia memoro tiuj bildoj de homoj irantaj spirale sub la mistera lumo de la kristalo, ili levis supren siajn manojn, fermis la okulojn, preĝis. Mi ja komprenis, ke komenciĝis nova etapo en la historio de Legio de Bona Volo. Poste mi intervjuis por la Pola TV Fraton Paiva Netto, Direktoro-Prezidanton de LBV, kaj starigis al li demandon, kiu estigis la gravan respondon pri la Kristo Ŝtatisto*, Spirito de la Senfina Ekumenismo."*




S-ro Roman estas ĝoje akceptita de la infanoj de Instituto pri Edukado de LBV, en San-Paŭlo/SP, Brazilo

*Ĉi tiu grava respondo rezultigis la Proklamon pri la Kristo Ŝtatisto, farita de Paiva Netto, je la 30-a de decembro 1989, en la Templo de Bona Volo. La fakto reeĥis per ĵurnaloj de Brazilo kaj eksterlando.

## LBV estas distingata per revuo *Argentina E-Vento*

Septembre la revuo *Argentina E-Vento*, oficiala organo de Argentina Esperanto-Ligo, en sia n-ro 34, aperigis artikolon pri Legio de Bona Volo.

La revuo *Argentina E-Vento* per sia tiama redaktoro, s-ro **Rubén T. Diaconu Tkachenco**, publikigas diversajn novaĵojn esperante kaj hispane, kiuj pritraktas agadojn pri disvastigo de la internacia lingvo je tutmonda amplekso. Per tiu eldonaĵo oni reliefigis la agadon pri Planeda Civitaneco, kiun LBV plenumas, kaj kiu estas raportata en la revuo BONA VOLO. La penso de la direktoro-prezidanto de LBV, José de Paiva Netto, estas speciale elstarigita: *"Amo estas plej alta leĝo el tiuj, kiuj regas la socion".*


"Amo estas plej alta leĝo el tiuj, kiuj regas la socion"

REKTE EL JAPANIO

## Prof. Ŝigeki Maeda, direktoro de Oomoto Internacia en Brazilo, bondeziras la Templon de LBV

Prof. Ŝigeki Maeda, direktoro de Oomoto Internacia en Brazilo, sendis foton de sia familio al la direktoro-prezidanto de LBV, gratulante pro la fonddatrevena celebrado de la Templo de Bona Volo. El la japana urbo Kameoka, li skribis:

*"Respekteginda kaj kara majstro Paiva Netto, kaj ĉiuj estraranoj, membroj kaj subtenantoj de LBV, mi sincere gratulas vin pro la 19a datreveno de la Piramido-Templo. Do, el plej malproksima lando disde Brazilo mi, kune kun mia familio, elkore esprimas miajn dezirojn pri la plua prospero de LBV, pri la plua kontribuo por harmoniiĝo de ĉiuj religioj kaj por la eterna efektiviĝo de paco sur la Terglobo. "*



Maldekstre desktren: Yuriko Maeda, Shigeki Maeda kun la nepo Chiaki Maeda, Hiroko Maeda, Akihiro Maeda kaj Shigeta Maeda.




## LBV partoprenas Brazilan Renkontiĝon de Esperantistoj-Spiritistoj

Belkís Faria

Fotoj: Paulo César Pereira

Okazis de la 5-a ĝis 7-a de septembro, en Braziljo/DF, Brazilo, la 3-a Brazila Renkontiĝo de Esperantistoj-Spiritistoj, kies temo estis "La Transiĝado de la Tero".

La evento, kiu okazas ĉiujare, kunvenigis centojn da adeptoj el Brazilo kaj Eksterlando, krom invititoj kiel Legio de Bona Volo, kiu ekde sia apero, en 1950, apogas kaj uzas Esperanton kiel ilon por diskonigi siajn fratecajn idealojn, kiuj cetere inkluziviĝas en la ideаro de Dialektiko de Bona Volo.



Affonso Soares

Ĉe la solena malfermo, okazanta en Spiritisma Federacio de la brazila ĉefurbo, la reprezentanto de LBV, la esperantisto **Paulo César Pereira**, donacis la revuon *Tutmondigo de la Frata Amo* al la prelegantoj kaj esperantistaj-spiritistaj aŭtoritatuloj, kunlabore al la grava movado, kiu pasintjare kompletigis 100 jarojn da ekzistado en Brazilo.

La inaŭgura prelego pri la temo estis farita de la direktoro de la Departemento pri Esperanto de la Spiritisma Federacio de Brazilo (FEB), **Affonso Borges Gallego Soares**, kiu dankis pro la ĉeesto de LBV en tiu plia evento.



Nestor Masotti

Laŭ la prezidanto de FEB, **Nestor Masotti**, la renkontiĝo reprezentis la unuiĝon de klopodoj inter Esperanto kaj Spiritismo por disvastigado de la Evangelio kaj konstruado de nova mondo.

Laŭ la prezidanto de la organiza komitato, **Valdir Silvestre**, Esperanto proksimigas homojn unu al aliaj, aparte de lingvo aŭ kulturo, sen komercaj celoj. *"Esperanto estas, antaŭ ĉio, vokkrio de espero por pli bona Homaro. Mi volas danki, ke LBV estas inter ni"*, substrekis Valdir.



Valdir Silvestre



André Fernandes

# Fekunda grundo de espero

Jéssica Botelho kaj Felipe Duarte

Fotoj: Jéssica Botelho kaj Leontina Maciel

Freŝdate la urbo Fortalezo, en la ŝtato Cearao, gastigis tri gravajn eventojn, apoge al la tutmonda idiomo, nome la 43-a Brazila Kongreso de Esperanto, la 28-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso kaj la 7-a Infana Kongreseto, kiuj okazis en la Federala Universitato de Cearao (UFC) inter la 12-a kaj 16-a de julio 2008. Ĉiujare tiuj renkontoj akceptas, krom gvidantoj kaj reprezentantoj de la Esperantista Movado, ankaŭ parolantojn kaj simpatiantojn de la internacia idiomo, el Brazilo kaj eksterlando. Ĉi tiu eldono igis ĉiujn meditadi pri la temo *"Infano – kia grundo!"*, kiun oni disvolvis per kursoj, prelegoj, lanĉoj de libroj, beletraj kaj manartaĵaj ekspozicioj, enurbaj ekskursoj ktp.

La direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), José de Paiva Netto, ĉiam valorigis la infanojn per tiu konstanta aserto: *"Stultaj homoj pensas, ke infanoj estas stultaj"*. Ĉar li kredas, ke geknaboj estas la espero de la mondo, li defie proponis, ke ili organizu Konstatan Forumon de la Soldatetoj de Dio, de LBV. Tiel estas karese nomataj, en la Institucioj de Bona Volo (IBV-oj), tiuj infanoj kredemaj je la



Clayton Ferreira

Gelernantoj okaze de plaĉaj ludkreaj aktivecoj lernas Esperanton en Instituto pri Edukado de LBV en San-Paŭlo.






Ĉiuaĝaj kongresanoj vizitas la budon de LBV, kie estas disponeblaj la publikigaĵoj en Esperanto de Eldonejo Elevação.



"La idealoj, kiujn LBV kaj Paiva Netto defendas perfekte kongruas kun la brila kaj bela Ekumenismo, kiu vere celas aliformigi la spiritan vidpunkton de la mondo. Mi sole nur devas danki la oportunon diskonigi per Esperanto la ideojn de Paiva Netto kaj la Idealon de LBV. "

**Paulo Sérgio Viana**
Vicprezidanto de la Brazila Esperanto-Ligo


idealo pri Bono. En tiuj lokoj ĉiuj ili havas la okazon lerni kiel pensi kaj agadi kun respondeco.

LBV reprezentiĝis en la evento per la skipo de sia Departemento pri Esperanto: **Leontina Maciel**, **Maria Aparecida da Silva**, **Paulo César Pereira** kaj la junaj **Jéssica Botelho** kaj **Felipe Duarte**. En la okazo, LBV venigis al la kongresanoj sian ekumenan mesaĝon per jenaj publikigaĵoj: la revuoj *Tutmondigo de la Frata Amo, Solidara Socio, Paco por la Jarmilo* kaj *BONA VOLO*, krom jenaj informiloj: *Templo de Bona Volo, unu el la Sep Mirindaĵoj de Braziljo* kaj *Unu jarcento de japana enmigrado en Brazilon*. La infanoj, ĉefaj protagonistoj de la evento, estis regalataj per jenaj porinfanaj libroj: *La mallaborema formiko, Ruĝa Fiŝeto, Furnario* kaj *Naskiĝo de Jesuo*. La partoprenantoj de la evento eĉ povis spekti videon pri la Templo de Bona Volo (TBV), la Templo de Paco (situanta ĉe SGAS 915, Lotes 75/76, Braziljo/DF, Brazilo – Tel.: (+55 61) 3245-1070 – <www.tbv.com.br>).


## Solena malfermo montras sian brazilecon

Diversaj kulturaj aspektoj, kiuj montras la identecon de Brazilo, enestis en la programeroj de la solena malfermo de la Kongreso. Tuj en la komenco oni prezentis videon pri Esperanto, kiun sekvis kantado de la brazila kaj esperanta himnoj, kaj de la kanzono *Akvarelo de Brazilo*, krom tipaj nordorientaj dancoj, poemoj kaj omaĝoj al infanoj. Ĉe la oficiala cerimonia podio sidis prof. **José Passini**, prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo (BEL); **José Leite de Oliveira Júnior**, reprezentanto de Departemento pri Literaturo ĉe UFC; **Felipe de Oliveira Queiroz**, prezidanto de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO); **Yuri Jivago Zigmantas**, respondeculo pri la programo de la Infana Kongreseto; d-ro **Wandemberg de Moraes**, prezidanto de Esperanto-Asocio de Fortalezo, i.a..


La kuracisto kaj tradukisto **Paulo Sérgio Viana**, intervjue al Superreto Bona Volo




La prezidanto de la Brazila Esperanto-Ligo (BEL), profesoro José Passini (dekstre) kaj Felipe Duarte, de LBV.



Jezuita pastro Peter Knauer, de Belgio, ricevas la revuon *Paco por la Jarmilo.*



Paulo Carvalho, prezidanto de la Asocio de Esperanto de Rio-de-Ĵanejro kun la revuo *Tutmondigo de la Frata Amo.*

pri Komunikado (radio, TV, interreto kaj revuo), komentis pri la agadoj, kiujn la Institucio plenumas favore al la socieduka kaj spirita elvolviĝado de Homoj: *"Lastatempe unu el la laboroj, kiuj plej ĝojigas min estas traduki tekstojn de la libro* Pensoj de la Animo*, verkita de Paiva Netto. Belega libro, kies legadon mi rekomendas al vi, ĉar traduki ĝin estis ne nur interesa kaj instrua tasko por mi, sed ankaŭ pliboniga por mia Spirito. (...). La idealoj, kiujn LBV kaj Paiva Netto defendas per ĉi tiu libro kaj per aliaj artikoloj, kiujn mi tradukis por la revuo BONA VOLO, perfekte kongruas kun la brila kaj bela Ekumenismo, kiu vere celas aliformigi la spiritan vidpunkton de la mondo. (...) Mi sole nur devas danki la oportunon diskonigi per Esperanto la ideojn de Paiva Netto kaj la Idealon de LBV. Paiva Netto, mi gratulas vin!*

Ankaŭ aliaj esperantistaj personuloj registris sian opinion pri la avangarda laboro de Legio de Bona Volo. Prof. José Passini, ekzemple, reliefigis la senliman Ekumenismon proponatan de LBV, rekonante ĝin kiel fratecan movadon, kies plej kara aspiro estas la strebo proksimigi Homojn per Paco.

Siavice, la prezidanto de Esperanto-Asocio de Braziljo, **Wilson Oliveira**, salutis la reprezentantojn de la Institucio kaj memorigis sian ĉeeston en la 4-a Brazila Renkonto de Esperanto, okazinta en la Monda Parlamento de Ekumena Frateco – la Parlamundi de LBV – en Braziljo/DF la ĉi-jaran aprilon. *"Ni multe dankas al LBV pro ĉi tiu grava helpo. Mi sciigas, ke okaze de vizitoj de eksterlandaj esperantistoj al Brazilo, en nia ĉefurbo, mi kutime akompanas ilin al Templo de Bona Volo, kaj al ili mi prezentas faldfoliojn pri Esperanto, kaj mi klarigas pri la graveco kalkuli je LBV kiel apoganto de Esperanto en Brazilo"*, li diris.

Ĉe la fino de la cerimonio, la ĉefprelegantо dankis pro la raportado pri la oficiala solena



Solena malfermo de la 43-a Brazila Kongreso de Esperanto. Reliefe, parta aspekto de la publiko.





Wilson Oliveira, prezidanto de Esperanto-Asocio de Braziljo, intervjue al Super RBV.


Poeto kaj amiko de LBV, José Saraiva Matos, lasas mesaĝon al verkisto Paiva Netto.



Fabiano Henrique Miranda, de Radio Rio de Janeiro, kun la revuo *Tutmondigo de la Frata Amo.*

malfermo farita de Superreto Bona Volo pri Komunikado.

## Ekumena momento

En la posttagmezo de la 13-a de julio, kadre de la programo de la 28-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso, Legio de Bona Volo, per sia reprezentanto, prelegis pri la temo "Senlima kaj Tuta Ekumenismo de LBV". Ĝin prezentis la junulo Felipe Duarte per la eseo "Dinamismo de Paco" verkita de Paiva Netto kaj publikigita per la revuo *Paco por la Jarmilo*, kiu estigis grandan intereson en la Pintkonferenco de Monda Paco por la Jarmilo realigita de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UN) en aŭgusto 2000.

La agemulo de Bona Volo reliefigis pecon el la publikigaĵo, sur paĝo 13, en kiu la aŭtoro klarigas: *"Senlima Ekumenismo predikas la perfektan kunrilaton inter ĉiuj estuloj, konsekvence, de ĉiuj surteraj nacioj. Tuta Ekumenismo antaŭvidas ian fratecan aliancon inter la Homaro de la Tero kaj tiu de la Supera Spirita Mondo kaj iu ajn civilizacio eventuale ekzistanta en la Spaco".*

Tia avangarda standardo, kiu akompanas LBV-on ekde ĝiaj unuaj jaroj, mirigegis la kongresanojn. Kiel parto de tiu aktivado, oni spektigis videon pri la Templo de Bona Volo, aklamata de la Popolo kiel unu el la Sep Mirindaĵoj de Braziljo/DF.

Unu el la kongresanoj ĉeestantaj la prelegon, la germana pastro **Peter Knauer**, kiu loĝas en Belgio, diris, ke lin impresis la propono de Senlima Ekumenismo de LBV, kaj substrekis: *"Dio havas Amon al ĉiuj"*. Laŭ li, ni devas ĉiam subteni Fidon por ke ni iĝu indaj je Dia protekto.

## Infana Kongreseto

Ankoraŭ kadre de la kongresa programo, Eldonejo Elevação, reprezentata per Jéssica Botelho kaj Felipe Duarte, lanĉis la porinfanajn librojn *Furnario* kaj *Naskiĝo de Jesuo*, el la serio *Soldatetoj de Dio* okaze de la 7-a Infana Kongreseto.

Komence la skipo parolis pri la socieduka laboro, kiun LBV proponas al infanoj en siaj pluraj komunumaj, edukaj kaj klerecaj centroj en Brazilo kaj eksterlande, per Lecionoj pri Ekumena Moralo (portugale



La celo de la renkonto estas pensigi eblecojn por disponigi al infanoj rimedojn necesajn por lernado kaj natura uzado de la idiomo, tiel ke ili iĝu estontece diskonigantoj.

AMEs), inter aliaj agadoj. Sinsekve, oni legis por la infanoj la rakontojn de tiuj du libroj, unue esperante kaj poste portugale, kio ebligis momenton de komuna interagado.

S-ino **Marly Cordeiro Barbosa**, kiu ĉeestis la prezentadon de LBV, ĉe la lanĉo de la libroj, montris sian admiron pri la propono: *"Mi volas gratuli la laboron, kiun LBV faras nuntempe. Plej mirigis min la scio, ke gejunuloj, kiel vi, ja laboradas por la humana elvolviĝo de tiuj infanoj ĉeestantaj. (...) Ili neniam forgesos la mesaĝon, kiun vi pasigis. Mesaĝo pri Paco, Amo kaj pri la Familio, kiu estas esenca afero".*

## Reeĥo

Granda estis la publiko, kiu vizitis la budon de Legio de Bona Volo en la 43-a Brazila Kongreso de Esperanto, finiĝinta la 16-an de julio. La budo estis unu el la plej vizitataj pro la enlanda kaj eksterlanda rekono de la Institucio, ĉar en la evento reprezentiĝe ĉeestis germano, usonano, franco, belgo, argentinano, japano i.a..

Kiu ĉeestis, nepre volis kunĝui kun la aŭskultantaro de Superreto Bona Volo pri Komunikado la ĝojon konatiĝi kun la laboro de la Institucio. Tipa ekzemplo estas tiu de la instruisto **José Saraiva Matos**, verkisto kaj poeto, amiko de LBV kaj aŭskultanto de Superreto Bona Volo de Radio, kiu diris: *"Tie ĉi en Fortalezo, kiel ankaŭ en aliaj brazilaj lokoj kaj mondopartoj, LBV diskoniĝas danke al la eksterordinara laboro de nia Frato Paiva Netto".*

Sinjoro **Paulo Carvalho**, prezidanto de E-Asocio de Rio-de-Ĵanejro, sciigis, ke la unua informo, kiun li ricevis pri Esperanto-lingvo estis tio, kiu, per revuo *BOA VONTADE*, en partejo "Soldadinhos de Deus" [Soldatetoj de Dio], kaj ke LBV plantis semon de Esperanto en lia koro. Poste ĉi tiu semo fruktdonis, lin kondukante survoje de la internacia idiomo.

Pro la sukcesinta partopreno de LBV en la 43-a Brazila Kongreso de Esperanto, la junulo **Fabiano Henrique de Miranda**, el Radio Rio de Janeiro kaj el gazeto *Correio Espírita*, intervjuis la reprezentantojn de la brazila Institucio ĉeestantajn en la evento. Dum la parolado, li reliefigis sian entuziasmon pri la paĝaro en Esperanto en la TTT-ejo Bona Volo <www.bonavolo.com>.

Kiel grava instiganto por la diskonigado de la internacia idiomo Esperanto, la gvidanto de LBV alvokas: *"Ni iru antaŭen memfide, sed ĉiam diligentaj, pri la streboj plenumataj enlande kaj tutmonde. Antaŭ tiaj valoraj oportunoj ni prezentu nian sinceran kunlaboradon de institucioj estigitaj en la sino de la socio, kiu tagon post tago konscias pri siaj rajtoj kaj devoj kiel civitano, per kiuj ili nepre konstruos pli bonan Brazilon kaj pli feliĉan Homaron. Ne en malproksima estonteco, sed kiel eble plej proksime".* ■



**SKIPO DE LBV EN LA 43-A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO**


De maldekstre dekstren: Felipe Duarte, Jéssica Botelho, Maria Aparecida da Silva, Paulo César Pereira kaj Leontina Maciel.

## Havu hejme la publikigaĵojn de Eldonejo Elevação




Mesaĝoj pri ekumena spiriteco por konstrui ian Solidaran Socion. Ĉi tiuj estas la eldonaĵoj, je granda internacia eĥo, liveritaj al aŭtoritatuloj, delegitaroj el pluraj landoj, reprezentantoj de neregistaraj organizoj kaj Ŝtatestroj okaze de eventoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj.

**Prezo po unu presita ekzemplero**: US$ 12 (ne inkluzivas sendokoston)




LBV prezentas siajn spertojn akiritajn dum preskaŭ ses jardekoj pri defendo de Homaj Rajtoj kaj ĝi estas distingita de registaraj reprezentantoj kaj delegitaroj el pluraj nacioj

# Homaj Rajtoj


## Kio ŝanĝiĝis sesdek jarojn poste

Danilo Parmegiani kaj Sarah Jane

Fotoj: Adriana Rocha, Adalgiza Periotto, Danilo Parmegiani, Haroldo Rocha kaj José Gabriel Paes




Ĝenerala subsekretario de UN por Komunikado kaj Publika Informado, **Kiyo Akasaka**, ricevas la mesaĝon de LBV.



**Hanifa Mezoui**, Sekciestrino de NRO-oj ĉe la Departemento pri Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj de UN (UN/DESA), montras ekzempleron de la franca versio de *Tutmondigo de la Frata Amo*.



**Koïchiro Matsuura**, ĝenerala direktoro de Unesco, ricevas ekzempleron de la angla versio de *Tutmondigo de la Frata Amo*.

Tie en Parizo, la 10-an de decembro 1948, en la Palaco Chaillot, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj aprobis la Universalan Deklaracion pri Homaj Rajtoj. Inspiritaj de la Franca Revolucio (1789) — kies principoj estis Libereco, Egaleco kaj Frateco —, homoj el la tuta mondo kunagadis cele eviti ripeton de barbaraĵoj kiel tiuj okazintaj dum la Dua Mondmilito. Ĉiuj konsentas, tamen, ke multo ankoraŭ farendas por garantii, ke *"ĉiuj homoj estu denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedu racion kaj konsciencon, kaj kondutu unu al alia en spirito de Frateco."*, laŭ tekstas la unua paragrafo de la dokumento.

> **"(...) LBV devas instrui aliajn NRO-ojn, nome pasigi siajn konojn".**
> **Hanifa Mezoui**

Por reafirmi tiun tutmondan strebon — kaj ankaŭ memorfesti la 60-jariĝon de agnosko de tiu dokumento — la Lumurbo refokusigis la temon, inter la 3-a kaj 5-a de septembro, okaze de la 61-a Jara Konferenco de Ne-Registaraj Organizoj de la Departemento pri Publika Informado (DPI/NGO), organo de Unuiĝintaj Nacioj. Aŭtoritatuloj, delegitaroj el pluraj landoj kaj neregistaraj organizoj pridebatis la temon "Reafirmi la Homajn Rajtojn: la Universala Deklaracio 60 jarojn poste".

Por pridiskuti la efektivan aplikadon de la homaj rajtoj, la partoprenantoj kunvenis per kvin rondaj tabloj, 42 laborgrupoj kaj multaj samtempaj debato-sesioj. La programo de la konferenco konsistis ankaŭ






**(1)** Ĝenerala aspekto de Unesco-Aŭditorio en Parizo, Francio. **(2)** Meze de la foto, kvar el la reprezentantoj de Legio de Bona Volo partoprenas en la debatoj: tuj malantaŭe, Noys kaj Haroldo Rocha, reprezentantoj de LBV de Portugalio; plej antaŭe, Angélica Periotto, respondeculino pri la franca versio de la TTT-ejo Bona Volo, kaj Danilo Parmegiani, kiu reliefe parolas en la konferencejo de Unesco.




Sekciestrino de NRO-oj de DPI, **Maria-Luisa Chávez**, estas salutata de reprezentanto de LBV: *“Estas ankaŭ la unua fojo, ke registriĝas pli ol 2.400 personoj el ĉiuj mondopartoj, kaj mi povas diri, ke tio estas tre pozitiva. Ni laboras iom pli kun Latinameriko, kaj esperas venontjare povi viziti ĝin”.*



**Shamina de Gonzaga**, prezidantino de la 61-a Jara Konferenco de Ne-Registaraj Organizoj de la Departemento pri Publika Informado (DPI/NGO), intervjuiĝas por Bona Volo Internacia.



La juristo **Karel Vasak**, redaktoro de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj kaj jura ekskonsilanto de Unesco, ricevas la francan eldonon de *Tutmondigo de la Frata Amo*.



La prezidanto de Congo, **Liberato Bautista** (meze), kaj la vicprezidantino de la Organizo, **Ilona Graenitz**, estas bonvenigataj de LBV.

el artekspozicio pri la Deklaracio, skeĉoj pri la temo, rakontistoj — kiuj prezentis personajn vivspertojn kadre de projekto sponsorita de Instituto pri Disvolviĝo de Edukado, Arto kaj Distraĵo (portugale, IDEAL) — kaj, kiel publika allogaĵo, Vilaĝo de Homaj Rajtoj, spaco por dinamikaj diskutoj kaj interagadoj pri la signifo de la teksto proklamita de Unuiĝintaj Nacioj.

La ĝenerala subsekretario de Unuiĝintaj Nacioj por Komunikado kaj Publika Informado, **Kiyo Akasaka**, dum intervjuo al Superreto Bona Volo pri Komunikado — kiu raportis la tutan eventon —, memorigis la celon de la debatoj: *“Jen kial ni okazigas tiun ĉi konferencon kun NRO-oj: por konkludi, kiu estas nia rolo kaj ĉu ĉiuj tiuj 30 paragrafoj de la Deklaracio estas bone plenumitaj, ĉu ili estas enkondukataj”.*






Fotoj: Disvastigado UN

Sub gvideco de la diplomatino kaj prezidantino de la Komitato pri Homaj Rajtoj ĉe UN, **Eleanor Roosevelt** (1884-1962), tutmondaj aktivistinoj pri civilaj kaj politikaj rajtoj povis aliigi la revon de universala deklaracio al realaĵo. Sur la foto de 1949, la unua damo de Usono montras la afiŝon, en la hispana (Eleanor fotiĝis ankaŭ kun la angla kaj franca eldonoj). Supre, la brazilano **Austregésilo de Athayde** (1898-1993), kiu partoprenis la redaktan komisionon de la Deklaracio, parolas en UN la 10-an de decembro 1948. La eminenta brazilano estis ankaŭ prezidanto de la Honora Konsilantaro por Konstruo de la Monda Parlamento de Ekumena Frateco (ParlaMundi de LBV). En letero sendita al la gvidanto de LBV, la tiama prezidanto de la Brazila Akademio de Beletro (portugale, ABL), skribis: *“Kiel respondeca kunredaktanto de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, plaĉas al mi partopreni en tiu eminenta Konsilantaro”.*

# Egaleco inter seksoj atentindas

El la temoj prezentitaj, grava diskutado okazis ĉirkaŭ la virinaj rajtoj. La registara sekretariino ĉe Ministrejo pri Eksteraj Aferoj kaj Homaj Rajtoj en Francio, **Rama Yade**, emfazis la debaton, substrekante: *"(...) Gravas, ke per tiuj temoj oni pledu por ŝia sano kaj konsekvence por ŝia patrineco kaj kleriĝado. Estas tre kuraĝaj tiuj virinoj, kiuj batalas por siaj sanrajtoj, ne multe evidentaj por ĉiuj. Per ili okazas la liberiĝo, la sendependeco, kaj pro tio sanrajto estas esenca, ĝi estas la rajto je vivo (...). Niaflanke, ankaŭ ni laboras por la plenumiĝo de tiuj rajtoj".*

Sciinte pri la sociedukaj programoj*, kiujn Legio de Bona Volo plenumas favore al virinoj kaj al valorigo de la familia bazo por plibona mondo, la reprezentantino de la franca registaro asertis: *"Mi kredas, ke la progreso-mezurilo de iu socio estas la virino. Ili estas la unuaj viktimoj en konfliktanta socio, sed ili ankaŭ estas la unuaj protagonistoj de ĝia rekonstruo. Tial* ***estas grave klopodi por la virina afero, ĉar, kiel LBV ĝuste diris, pere de ili ni klopodas por la geedzoj, ni klopodas por la estonteco de infanoj kaj, konsekvence, por la familio. Jen bela vivo-filozofio".***



**Simone Veil**, fama internacia aktivistino kaj eksministrino de la franca Registaro, ricevas la francan eldonon de *Tutmondigo de la Frata Amo* el la manoj de Angélica Periotto.




La registara sekretariino ĉe Ministrejo pri Eksteraj Aferoj kaj Homaj Rajtoj en Francio, **Rama Yade**, intervjue al Bona Volo Internacia.

Ankaŭ reliefe ĉeestis la DPI-eventon la eksa ministrino pri Sano kaj membro de la Konstitucia Konsilantaro de Francio, s-ino **Simone Veil**, kiu parolis en la malferma cerimonio kaj estis la ĉefpreleganto de la Konferenco. Konatiĝinte, pere de la Ekumena Junularo de LBV, kun la agadoj enkondukataj en Brazilon cele garantii la respekton al la Homaj Rajtoj, la eminenta aktivistino kaj politika figuro entuziasme reliefigis: *"Mi devas diri ke ĝi estas tre alloga lando, kie personoj estas kuraĝegaj. Mi surpriziĝas, kiam mi vidas — laŭlonge de mia vivo, kiu estas longa kaj plena je spertoj tre malsamaj — ĉi tiun engaĝiĝon de pluraj gejunuloj, ĉiam kun bonaj rezultoj".* Ŝi lasis ankaŭ mesaĝon al organizoj kaj personoj, ĝenerale, por ke ili helpu plivastigi tiujn rajtojn: *"Necesas esti ĉiam atenta. (...) Jen kio eblas fari kiel civilulo".*

* Unu el ili estas la programo *Civitano-Bebo*, kiu celas asistadon al gravedulinoj kaj virinoj kun infanoj ĝis unu-jaraj, en situacio de socia risko aŭ damaĝebleco, tiel kontribuante al la bonstato kaj bonfarto de la patrino, de la infano kaj de la familio, kaj por reduktigi subnutradon kaj infanmorton. Krom tio, LBV gvidas informedukajn prelegojn kaj realigas kulturajn eventojn kaj metirondojn favore al la tuta familio.

Kiel tiama reprezentanto de la ĝenerala sekretario de UN, **Ban Ki-moon**, li prezentis resuman retrorigardon pri la ses jardekoj de la dokumento-subskribo: *"Post 60 jaroj, ni ankoraŭ atestas, ĉiutage per gazetaro kaj televido, novaĵojn pri barbaraĵoj, personoj mortigataj, personoj senigitaj je libereco. Ni bezonas la apogon kaj kunlaboron de ĉiu partoprenanto de Unuiĝintaj Nacioj".*

Koncerne kunlaboradon de organizoj kaj civila socio, cele antaŭenigi plibonigojn en la Homaron, la ĝenerala subsekretario, Akasaka, asertis: *"UN plu laboros por plivastigi Homajn Rajtojn ĉie, sed tiuj NRO-oj, partoprenantaj tiun ĉi konferencon, estas ĉiuj rekte engaĝitaj. (...) La helpo de amaskomunikilo tiucele estas tre grava. Tial, mi estas tre dankema pro la partopreno de LBV en tiu ĉi konferenco!"* Akasaka, kiu deĵoris kiel japana ĝenerala konsulo en San-Paŭlo/SP, Brazilo, diris fine de la intervjuo: *"Mi scias, ke en Brazilo estas multaj NRO-oj kaj homoj laborantaj favore al Homaj Rajtoj. Mi deziras al LBV ĉion bonan kaj*



La regiona urbestrino de Parizo, **Yamina Benguigui** (maldekstre), prizorgantino de Homaj Rajtoj kaj movado kontraŭ antaŭjuĝo, asertis: *"Mi tutkore deziras longan vivon al LBV, ĉar efektive sen tiu kora eco, sen edukado, sen tiu ponto inter viro kaj virino, ni ne povus atingi tiun ĉi rezulton. Tial, LBV havas mian tutan apogon!"*.

*konstantan laboron ĉe Unuiĝintaj Nacioj"*.

En la okazo, la prezidantino de la 61-a Konferenco de la Departemento pri Publika Informado ĉe UN, okazinta ĉi-jare, **Shamina de Gonzaga**, parolis al reprezentantoj de Legio de Bona Volo. Reliefigante la gravecon pri la Universala Deklaracio, ŝi menciis la ekzemplon de la admirinda prezidantino de la Komitato pri Homaj Rajtoj ĉe UN, **Eleanor Roosevelt**: *"Ĉu vi povas imagi ŝian strebadon? Kaj jen ni, 60 jarojn poste. Pliaj miloj da personoj konsentas pri tiu pensmaniero (...). Ĉi tiu deklaracio prezentas valorojn, pri kiuj ni havas la oportunon kaj respondecon vivi laŭ ilia indeco"*.

## LBV defendas Edukadon kun Spiritualeco ĉe Unesco

Por plenumi agadojn koncer-




La vic-urbestrino de Parizo, s-ino **Anne Hidalgo** (dekstre) apud Angélica Periotto, de LBV.




**Roland Rich**, ekzekutiva direktoro de la Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por Demokrateco, kune kun Noys Rocha, el la portugalia LBV.

nantajn la Celoj por Evoluado de la Jarmilo (angle, MDG), Legio de Bona Volo ricevis inviton por prezenti, en la Jara Konferenco de Ne-Registaraj Organizoj de la Departemento pri Publika Informado, sian ampleksan socieedukan laboron faratan jam de preskaŭ ses jardekoj. La Institucio, kiu estas aliĝinta al DPI ekde 1994, ĝuas statuson de ĝenerala konsultanto ĉe la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN (Ecosoc) ekde 1999, kaj partoprenis en la evento danke al perado de sia reprezentanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj, **Danilo Parmegiani**. Parolante en la kunsido de Unesco, en la dua tago de la evento, li reliefigis la laboron



**Bacre Ndiaye**, direktoro de la Sekcio pri Homaj Rajtoj de la Supera Deligitaro pri Homaj Rajtoj de UN, ricevas la revuon *Tutmondigo de la Frata Amo*.



**Eric Falt**, direktoro de la Sekcio por Promocio ĉe DPI de UN, ricevas la mesaĝon de LBV.



La eksa konsilanto de Monda Banko, **Alfredo Sfeir-Younis** (maldekstre), apud Danilo Parmegiani, de LBV.


de LBV, kiu superis, en 2007, la markon je 6 milionoj da asistadoj al personoj vivantaj en malriĉecujoj, tiel plifirmigante sin kiel unu el tiuj neregistaraj organizoj en Latinameriko, kiu plej agadas cele al

**E□O** En alia konferenco, fokusanta Homajn Rajtojn, kiu okazis la 10-an de septembro, en la Brazila Gazetara Asocio (portugale, ABI), en urbo Rio-de-Ĵanejro/RJ, la direktoro de la Centro pri Informado de Unuiĝintaj Nacioj en Brazilo (UNIC-Rio), d-ro **Giancarlo Summa** (reliefe), parolis pri la signifaj agadoj realigataj de UN, kiuj garantias tiujn rajtojn, substrekante: *"Temas pri granda laboro en Latinameriko, en la tuta mondo. UN sin devontigas, engaĝiĝas la tutan tempon, unuacele, por diskonigi Homajn Rajtojn. (...) Iuj valoroj el tiuj homaj rajtoj estas fundamentaj por iu ajn socia kaj politika agado, por laboro de iuj ajn registaro"*. En la okazo li reliefigis la partoprenon de Legio de Bona Volo en la pariza evento: *"Mi estis en Francio, en la DPI-konferenco de Unesco, kaj tie mi renkontis reprezentantojn de LBV. Legio de Bona Volo plenumas tre signifan agadon ĉe UN"*.


Vivian Ribeiro

## Publikigaĵo de LBV estas priparolata en mezorienta evento

Tutmondigo de la Frata Amo, jen kion rekomendas Legio de Bona Volo al pluraj nacioj. Tiu tezo estas la rezulto de multjara travivaĵo de la direktoro-prezidanto de LBV, José de Paiva Netto, enkondukata en la diversajn asistejojn, kiujn la Institucio funkciigas en siaj memstaraj centroj enlande kaj alilande. La resumo de tiuj agadoj, kiuj entuziasmigas kunlaborantojn en ĉiuj mondopartoj, estas publikigitaj en dokumento speciale liverita de li al oficialaj reprezentiĝoj okaze de pluraj eventoj, en kiuj ĉeestis LBV.


José Gabriel Paes, de LBV, kune kun la amiko de la Institucio, la ambasadoro **Anwarul Chowdhury** (dekstre), eksa ĝenerala subsekretario de UN.

Tiu mesaĝo pli kaj pli estas reliefigata de siaj legantoj. La ambasadoro **Anwarul Chowdhury**, eksa ĝenerala subsekretario de Unuiĝintaj Nacioj, konfirmis tion, dum rakonto de fakto okazinta en Mezoriento. Post prelegi pri paco-kulturo, en Barejno, iu ĉeestanto salutis lin kaj faris aludon al publikigaĵo de LBV. La ambasadoro komentis, ke la laboro de LBV plivastiĝas: *"Legio de Bona Volo realigas mirindan laboron kaj mi kuraĝigas ilin antaŭenigi sian homaman agadon"*.

### Tutmondigo de la Frata Amo






plenumiĝo de Homaj Rajtoj. Pro sia mesaĝo frateca kaj respektanta la Homon, LBV ricevis gratulvortojn de organizoj de landoj kiel Argentino, Niĝerio, Francio kaj Anglio.

**Liberato Bautista**, prezidanto de la Konferenco de NRO-oj en Konsultaj Rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj (Congo), en Vieno, Aŭstrio, reliefigis la ĉeeston de Legio de Bona Volo en la evento kaj la rolon de Homaj Rajtoj por la mondo: *"Estas plezuro pluan fojon renkonti LBV-on tie ĉi. (...) La streboj por Homaj Rajtoj fariĝas gravaj, kiam estas manĝo sur la tablo de malsatulo; kiam estas ŝirmilo super la kapo de almozulo; kiam estas kuracilo por malsanulo; kiam estas skribilo por infano en bazlernejo. Se ni malsukcesos en tiaj aferoj, la streboj por Homaj Rajtoj rezultigos nenion. Do, se ni eliros de tiu ĉi loko pli decidemaj fari tion, mi kredas, ke ni estos sukcesintaj en tiu ĉi Konferenco"*, reliefigis la prezidanto de Congo.

La reprezentantoj de LBV ankaŭ liveris al centoj da neregistaraj


D-ro **Mohinder Singh**, prezidanto de Bhai Sahib, reliefigis la Spiritualecon diskonigatan de LBV. Li fotiĝas apud Noys Rocha, de LBV.


Honorinda **Chueh Yann Shih**, ĝenerala direktorino de Internacia Asocio Lumo de Budho, apud Angélica Periotto, de LBV.


**Eugen Brand**, ĝenerala direktoro de Internacia Movado ATD por la Kvara Mondo, ricevas la francan eldonon de la revuo *Tutmondigo de la Frata Amo.*


Funkciuloj de Unesco legas la anglan version de la revuo *Tutmondigo de la Frata Amo.*



**Gillian Sorensen**, pliaĝa konsilantino de Fondaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, kaj Danilo Parmegiani, el usona LBV.


**Jayanti Kirpalani**, eŭropa direktorino de la Monda Spirita Universitato Brahma Kumaris, ĝoje rememoris sian viziton al TBV.


Dum la ŝtupara purigado de la Preĝejo Magdaleno, la Legiana Grupo renkontis la kantistinon **Preta Gil** kaj la entrepreniston **Roberto Chaves**, unu el la organizantoj de la festo, kaj ili ambaŭ estis salutataj de LBV.

reprezentantoj kaj al delegitoj el pluraj landoj la revuon *Tutmondigo de la Frata Amo* (en la angla, franca kaj hispana). Krom prezenti la vastan laboron de la Organizo, la publikigaĵo aperigas la ĉefartikolon *“Ok Celoj por la Jarmilo — Zorga atento flanke de ĉiuj prudentaj homoj”*, de aŭtoreco de la ĵurnalisto, radikronikisto kaj verkisto Paiva Netto. Per ĝi la gvidanto de LBV pledas por paradigmo-ŝanĝo por ke estiĝu ia Ekumena, Altruisma, Solidara Socio, kiel oni legas en tiu ĉi peco: *“(...) Solidareco plivastiĝis en la luma kampo de etiko kaj sin prezentas kiel strategio, tiel ke la Homo povu konkeri sian vivtenadon. Kontraŭ tutmondigo de mizero ni proponas tutmondigon de Frateco, kiu spiritualigas Ekonomikon kaj solidare ĝin disciplinas, kiel fortan ilon por reago kontraŭ pseŭdofatalismo de malriĉeco (...)”.*

Per la sama eldono de la revuo, la partoprenantoj de la Konferenco povis sekvi la konkludojn de la



**Henri Claude Briette**, vicprezidanto de la Franca Asocio de Posteŭloj de Enloĝantaj Alilandanoj, apud Adriana Rocha, el usona LBV.

Kunsido de la Supera Instanco de UN (*High-Level Segment*, okazanta en junio 2008). Ricevinte la publikigaĵon de LBV, la Sekciestrino de NRO-oj ĉe la Departemento pri Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj de UN (UN/DESA), s-ino Hanifa Mezoui, reliefigis la kompetentecon kaj lertecon de la Institucio disponigi la informojn al la mondo: *"LBV pintas. Vi devas instrui aliajn NRO-ojn, nome pasigi viajn konojn"*.

## Civila socio organizata por plibona mondo

La socia inkluziviĝo de handkapuloj kun specialaj bezonoj estis la ĉefa punkto de la prelego prezentata de la organizo *Brothers*

Kovrilreprodukto de faldfolioj, en la franca, kun la ekumena mesaĝo de la direktoro-prezidanto de LBV.






# Ekumena mesaĝo de la verkisto Paiva Netto atingas Francion

Ankoraŭ dum restado en Parizo, antaŭ tieaj plej vizitataj monumentoj (*Trocadéro,* Borso-Placo kaj Preĝejo Magdaleno), reprezentantoj de LBV disdonadis fladfoliojn kun kvar ekumenaj mesaĝoj de la verkisto Paiva Netto, titolitaj: *La falo de ĉiaj Bastiloj*; *Ekvilibro kiel Celo*; *Vitejo kaj Skeptikismo* kaj *Religio ne kongruas kun maltoleremo*, krom la invito-informilo pri la Templo de Bona Volo, aklamita de la Popolo kiel unu el la Sep Mirindaĵoj de la brazila ĉefurbo. Por tiu ĉi raporto, ni elektis kelkajn situaciojn, kiuj montras la intereson de parizanoj pri la nova kaj pionira agado de la aŭtoro cele efektivigi Ekumenan, Altruisman, Solidaran Socion.














De maldekstre dekstren: Haroldo Rocha (portugalia LBV), la prezidantino de Afrika Infano-Reto en Niĝerio, s-ino **Nkem Oselloka Orakwue**, Noys Rocha (ankaŭ el portugalia LBV), s-ino **Ene Ede**, direktorino de *Equity Advocates* en Niĝerio, kaj Angélica Periotto, el brazila LBV.



Maldekstre dekstren: **Suzan**, **Mohammed Abdel Elbushra**, José Gabriel Paes, **Rehab**, **Amel** kaj **Mohamed Braima**, reprezentantoj de NRO en Sudano, kaj Angélica Periotto.



**Élcio Ramalho**, parolisto de Internacia Franca Radio, intervjuas Danilo Parmegiani, de LBV.

LBV estis invitita intervjuiĝi por UN-Radio, kiu havas pli ol 50 ricevostaciojn en la ok portugalparolantaj landoj, kaj por Internacia Franca Radio (IFR), ĉefa radiostacio en Francio. El tiu ĉi, la portugala mesaĝo estis reelsendita al 30 brazilaj radiostacioj. Kaj la tuta materialo prezentata de Legio de Bona Volo en la Konferenco estos kunuzata de la plenuma konsilantaro de DPI mem, kiu montris sin tre impresita pro la agado de la Instituciο.



René Stockman

*of Charity* [Fratoj de Karitato]. **René Stockman**, ĝenerala estro de la institucio, raportis pri la agado realigata de la organizo kaj gratulis la iniciaton de LBV koncerne edukadon de infanoj kaj gejunuloj: *"Kiam mi aŭskultas la vortojn Amo kaj Respekto, mi pensas, ke tiuj estas la efektivaj valoroj, la bazoj por vera ŝanĝo de pensmaniero. Ni, el* Brothers of Charity*, laboras por la proksimulo per tiu Amo, kiu naskas Solidarecon per respekto. Mi pensas, ke tiu laboro de LBV, kiu inkluzivas valorojn de Amo kaj Respekto, estas la ŝlosilo por plibona estonteco. Tiu estas la sola vojo".*



Lamao Gangchen

Renkontante la reprezentantojn de Legio de Bona Volo en la evento, la **Lamao Gangchen** sendis jenan mesaĝon: ***"Estas tre bone paroli kun LBV, kiu laboras tre mirinde. Mi jam vizitis la Templon de Bona Volo. LBV estas gajetosa, agema brazila asocio. Miajn salutojn al Paiva Netto, kiun mi renkontis plurfoje".*** ■



**SKIPO DE LBV EN LA 61-A KONFERENCO DE NRO-oj DE DPI/UN** Maldekstre dekstren: Adriana Rocha, Danilo Parmegiani, Adalgiza kaj Angélica Periotto, Noys kaj Haroldo Rocha kaj José Gabriel Paes.



# Defio de daŭripoveco

## LBV prezentiĝas antaŭ Ŝtatestroj okaze de Kunsido de Supera Instanco de UN pri memsubtena elvolviĝo

Danilo Parmegiani kaj Rodrigo de Oliveira

Fotoj: Adriana Rocha, Daniela Duarte kaj Eduardo Lemos

Se unuflanke nin ĝojigas la kreskanta naturmedia konsciiĝo, aliflanke nin spitas defiaj okazaĵoj: glacimontoj pli rapide degelas*, arbaroj cindrumas, akvo ne sufiĉas por miliardoj da homoj...Pro tiuj kaj aliaj demandoj, plivastigi ekologian konsciiĝon ĉe la Homoj, cele malpliigi la efektojn de tutmonda varmiĝo, fariĝas peniga tasko plenumata de tiuj, kiuj kredas eblan evoluon per daŭripoveco.

Per tia konscio Organizo de Unuiĝintaj Nacioj okazigis, de la 30-a de junio ĝis la 3-a de julio, la Kunsidon de Supera Instanco 2008 (*High-Level Segment*) de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN (Ecosoc) en sia novjorka sidejo, en Usono. Sub la temo *"Enkonduki la celojn kaj devojn internacie akordigitajn por memsubtena elvolviĝo"*, la evento kunvenigis delegitarojn el ŝtatojmembroj, reprezentantojn de organizoj aliĝintaj al UN kaj de la civila socio, el kiuj inkluziviĝas entreprenoj, institucioj neregistaraj kaj ankaŭ fakesploraj.

Ĉeestis en la malferma kunsido tutmonde konataj fakuloj kiel la Nobel-Premiito pri Paco (2007) **Rajendra Pachauri**, prezidanto de Interregistara Panelo pri Klimata Ŝanĝiĝo (angle, IPCC), kaj la eksa ĉefekonomiisto el *Bird*, **Nicholas Stern**, aŭtoro de grava studo pri la temo.

### LBV reprezentas Brazilon kaj Latinamerikon

La bonaj agadoj de latinamerika socio tiam reprezentiĝis per Legio de Bona Volo (LBV), kiu preparis kaj alsendis dokumenton kun la opinio de tiuj 1600 organizoj, kiuj konsistigas la Reton por Solidara Socio. La rekomendoj de la Institucio estis tradukitaj al la ses oficialaj lingvoj de UN (araba, ĉina, hispana, franca, angla kaj rusa) kaj liveritaj, kun la aprobo de Unuiĝintaj Nacioj, al la delegitaroj ĉeestantaj la eventon.

D-ro **Richard Jordan**, prezidanto de la Konferenco de Departemento pri Publika Informado de UN (DPI) rilate al efektoj de klimataj ŝanĝiĝoj, taksis la materialon preparitan de LBV: *"Temas*

*La teksto aludas al glaĉero Perito Moreno, kiu rompiĝis komence de Julio, en argentina Patagonio; ia malofta fenomeno dum aŭstrala vintro. La glacero kovras proksimume 200 kvadratajn kilometrojn kaj mezume altas 70 metrojn super la nivelo de la lago, kie ĝi troviĝas.



"Temas pri bonega dokumento farita de Legio de Bona Volo, kiun nun ĉiuj delegitaroj de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro legas; ĝi estas antaŭtempa dokumento. (...) Ĝi reliefigas la Reton por Solidara Socio, tiun alrigardon de José de Paiva Netto".

**D-ro Richard Jordan**
Prezidanto de la Konferenco de Departemento pri Publika Informado de UN




Ĉe la budo de LBV, dekstren: **Saida Agrebi**, vicprezidantino pri Komunikado kaj Publikaj Aferoj ĉe Monda Organizo pri Familio, en Tunizio; d-ino **Hanifa Mezoui**, sekciestrino de NRO-oj ĉe UN/DESA; **Conceição de Albuquerque** kaj **Danilo Parmegiani**, el LBV; d-ro **Sha Zukang**, ĝenerala subsekretario de UN; kaj d-ino **Michele Fedoroff**, adjunkta sekciestrino de NRO-oj ĉe UN/DESA.

*pri bonega dokumento farita de Legio de Bona Volo, kiun nun ĉiuj delegitaroj de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro legas; ĝi estas antaŭtempa dokumento. Mi diras tion, ĉar unue ĝi reliefigas la Reton por Solidara Socio, tiun alrigardon de José de Paiva Netto. Mi persone travivis tiun Solidaran Socion kune kun infanoj ekologie tre konsciaj".*

Intervjue al BONA VOLO, Jordan menciis du devizojn kreitajn de la gvidanto de LBV, kiuj altiris lian atenton: *"Mi komencis per aludo al Paiva Netto – kaj mi finos mian paroladon substrekante lian eldiron: 'Promocii Edukadon kaj Klerecon kun Spiritualeco por ke estu Nutrado, Sano kaj Laboro por ĉiuj en formado de la Ekumena Civitano'. Laŭ la vortoj de Paiva Netto: 'La detruo de la Naturo estas la estingo de la Homa Raso'. Ni estas komunumo: Homo kaj Tero. Tio estas Solidareco!"*

Richard ankoraŭ memorigis la bonajn agadojn, kiujn li vidis en la renkontoj de la 2-a Forumo-Foiro pri Novaĵoj Reto por Solidara Socio, de LBV. *"Mi raviĝis pro la reedukiĝo pere de ideoj pri recikligado, kiujn la gelernantoj kunĝuis kun mi en la urbo Belo Horizonte. Recikligado estas entreprenema aktivado tre novigefika. Kaj tio ja estas memsubtena elvolviĝo. Kiam mi diras tion, mi sincere kaj honeste parolas; mi neniam kaj nenie vidis programojn tiel bele prizorgatajn, kiel tiuj de LBV en Brazilo".*

Kiu ĉeestis la eventon povis atenti la paroladon de LBV-reprezentanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj, **Danilo Parmegiani**, kiu aparte prelegis en la Ĉambro de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro. Lia partopreno estis anoncata de la vicprezidanto de Ecosoc, ambasadoro de Kaboverdo **Antônio Pedro Monteiro Lima.**

Tiu Ĉambro estas rezervata, dum Kunsido de la Supera Instanco de Konsilantaro, por kontribuoj de altrangaj reprezentantoj de registaroj kaj de ĉefaj agentejoj de Unuiĝintaj Nacioj pri la pritraktata temo. LBV lokiĝis inter tiuj kvin internaciaj reprezentiĝoj de la civila socio invititaj paroladi en la evento.

Post la prezentado de la reprezentanto de LBV, pluraj aŭtoritatuloj ricevis la revuon *Tutmondigo de la Frata Amo*, per kiu publikiĝas la artikolo "Ok Celoj por la Jarmilo – Zorga atento flanke de ĉiuj prudentaj homoj", verkita de la direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo, José de Paiva Netto. La publikigaĵo estas disponebla en la angla, esperanta, franca, germana, hispana, itala kaj portugala.

Ankaŭ diskoniĝis en la evento la faldfolio *"La detruo de la Naturo estas la estingo de la Homa Raso"*, artikolo verkita de la gvidanto de LBV, kaj la *Informilo Reto por Solidara Socio*, speciala eldono en la por-



Reprezentantoj de LBV: **Danilo Parmegiani** (maldekstre) kaj **Paulo Duarte** (dekstre), kune kun profesoro **Paulo Kramer**, politika sciencisto; senatano **Jefferson Praia**; ambasadoro **Graça Lima**, brazila konsulo en Usono; kaj federala deputito **Beto Albuquerque**.



S-ro **Hani Helal**, ministro pri Edukado en Egiptio apud Danilo Parmegiani, de LBV.



D-ino **Michele Fedoroff** kaj s-ro **Marc-Andre Dorel**, el UN, ricevas la mesaĝon de LBV.

tugala kaj la angla, kiu resume prezentas la aktivadojn de la 2-a Forumo-Foiro pri Novaĵoj Reto por Solidara Socio, realigita de LBV, en ok latinamerikaj urboj, dum la monato marto.

## Foiro pri Novaĵoj ĉe UN

Paralele al la programo de la Kunsido de Supera Instanco, la Foiro pri Novaĵoj — *Innovation Fair*, organizita de Ecosoc, altiris fondaĵojn kaj aliajn organizojn de la civila socio kaj de UN-Sistemo por kundividi modelojn de projektoj, pritraktojn kaj novigajn agadojn rilatantajn al la temo "Memsubtena elvolviĝo".

La brazila civila socio reprezentiĝis pere de Legio de Bona Volo. En sia plurmedia budo, la Institucio prezentis, per elpendaĵoj, rilattemaj pentraĵoj, paneloj, publikigaĵoj kaj videoj, la mobilizon realigitan en Latina-meriko dum la 2-a Forumo-Foiro pri Novaĵoj Reto por Solidara Socio, krom la laboro pri naturmedia edukado, kiun ĝi plenumas pere de diversaj komunikiloj kaj

## LBV ESTAS INVITITA DE UNESCO POR PRELEGI EN MINISTREJA DISKUTRONDO EN LA SIDEJO DE UN — NOVJORKO

Pluraj eventoj konsistigis la programon de la Kunsido de Supera Instanco. El inter ili, Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesco) okazigis ministrejan diskutrondon por debati la temon *Scienco, Teknologio kaj Renovigaj Politikoj: Ŝlosilo por memsubtena elvolviĝo*. Gvidata de la ĝenerala direktoro de Unesco, d-ro **Koichiro Matsuura**, la evento kunvenigis ministrojn el pluraj landoj koncernantaj la sferagadon de edukado, komunikado, scienco kaj teknologio.



Koichiro Matsuura

El inter tri mil organizoj en konsultaj rilatoj kun Ecosoc, LBV estis elektita por reprezenti la civilan socion. Kiel reprezentanto de LBV, **Conceição de Albuquerque**, magistrino pri Edukado, parolis pri la aspektoj de Pedagogio por Ekumena Civitano — Pedagogio de Amo —, eduka skolo diskonigata de la direktoro-prezidanto de LBV kaj uzata en la lernejoj de la Institucio. La direktorino de Unesco-oficejo, **Hélène-Marie Gosselin**, el Novjorko, kiu partoprenis en la ministreja diskutrondo, invitis la Organizon iĝi partnero en la agadoj de tiu UN-Agentejo.



## Ankaŭ ministrino Maria Teresa, el la Brazila Delegitaro ĉe UN, partoprenas la rilatteman kunsidon organizatan de LBV



Ministrino Maria Teresa Mesquita Pessoa (dekstre) ĉe la budo de LBV akompane de Adriana Rocha.

Organizata de LBV, la rilattema kunsido, kadre de la programo de la Kunsido de Supera Instanco de Ecosoc, kalkulis je la honora ĉeesto de ministrino **Maria Teresa Mesquita Pessoa**, kiu reprezentis la Brazilan Delegitaron ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Intervjue al UN-Radio la diplomatino resume parolis pri la enhavo de sia prelego: *"Mi komencis mian paroladon en la debato per citado de freŝdata artikolo de ekonomikisto* ***Paulo Nogueira Batista Filho****, per kiu li rakontas pri konferenco, kiun li ĉeestis ankoraŭ studento, en kiu iu generalo ekprelegis dirante, ke Amazonio ne apartenas al Brazilo, Amazonio estas Brazilo. Tiu frazo bone resumas kiel tiuj du aspektoj interplektiĝas. La nepra respondeco por konservado de Amazonio koncernas Brazilon; sendube ĝi estas defio, se paroli pri populara reprezentiĝo".*

Laŭ tiu rezonado, s-ino Maria Teresa bonvenigis: *"Gravas, kadre de tiu kunsido de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Unuiĝintaj Nacioj, ke la civila socio, reprezentata de Legio de Bona Volo, kaj la brazila Parlamento parolis pri Amazonio kaj pri tio, kion la brazila registaro faras por krei kondiĉojn por starigo de la leĝaro per enkonduko de uzadreguloj, kontrolaj mekanismoj kaj leĝaro instiganta produktivan kaj memsubtenan aktivadon en Amazonio".*







**(1)** Parta aspekto de la rilattema kunsido organizata de LBV en Unuiĝintaj Nacioj. Reliefe, elektronika montrilo informas pri debato-komenciĝo. **(2)** Reprezentanto de LBV kunfratiĝe kun ambasadoro **Piragibe Tarragô**, brazila vicreprezentanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj.

pere de siaj sociedukaj lernejoj, tiel instigante edukatojn al ekologia konsciiĝo kaj al travivado de spiritekumenaj valoroj.

La ĝenerala subsekretario de UN por Sociekonomiaj Aferoj, d-ro **Sha Zukang**, reprezentanto de la ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, **Ban Ki-moon**, post ricevi la revuon *Tutmondigo de la Frata Amo*, vizitis la budon de la Institucio, kie li gratulis al LBV pro ĝia laboro. Per ekskluziva intervjuo al TV Bona Volo (kanalo 23 ĉe SKY) li parolis pri kiel gravas, ke la civila socio progresigu la memsubtenan elvolviĝon: *"Mi tre dankas al LBV, ke ĝi partoprenas en tiu ĉi konferenco de Ecosoc per sia vizitinda ekspozicio. Mi certas, ke la partoprenantoj multe lernos el ĝi".*

Inter la aŭtoritatuloj, kiuj vizitis la budon de la Institucio, troviĝas **Marc-Andre Dorel**, direktoro de la Oficejo pri Kunordigado kaj Subteno ĉe Ecosoc, kaj **Joseph Owondo**, doktoro pri Internacia Juro kaj membro de la delegitaro de Gabono, kiu per propra iniciato afiŝis la inviton pri la kunsido de LBV en strategiaj lokoj ĉe UN. *"Mi volas gratuli al LBV. Mi memoras aŭdi pri Legio de Bona Volo, kiam mi ĉeestis doktorigan kurson ĉe Universitato de San-Paŭlo (USP), komence de la 1980-aj jaroj. Kalkulu ĉiam je mi!"*, deklaris Owondo.

D-ino **Michele Fedoroff**, adjunka sekciestrino de Ne-Registaraj Organizoj ĉe Departemento pri Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj de Unuiĝintaj Nacioj, kaj partopreninta en la 2-a Forumo-Foiro en Brazilo, vizitis la budon de Legio de Bona Volo en Novjorko. La reprezentantino de UN, kiu vizitis la latinamerikan eldonon de la Foiro



Joseph Owondo

pri Novaĵoj kiel oficiala misiulo de UN, eldiris: *"Mi kredas, ke vi el LBV bezonas danki vin mem kaj plurajn anojn de via Institucio pro la realigo de bonega laboro pere de tiuj eventoj, kiujn vi organizis en Brazilo marte. Mi estas tre ĝoja pro tio, kion vi portis al tiu ĉi grava evento de UN pri arbara protektado. Kiam mi vizitis la urbon Manaus, min ravis la kvanto da edukaj programoj, kiujn la registaro kaj NRO-oj partnere plenumas por eduki la loĝantaron kaj ankaŭ la indiĝenajn popolojn, tiel ke ili vivu en la arbaro ĝin protektante. Mi dankas al Paiva Netto pro la organizado kaj konstruado de mirinda Organizo, kaj pro tiel bela armeo da volontuloj, kiuj ĉirkaŭas lin tiel efike kaj sindediĉe".*

Funkciuloj kaj provlaboristoj ĉe UN vizitis la budon por manifesti sian apogon al la agado de Legio de Bona Volo ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Unu el tiaj kuraĝigoj venis el la provlaboristino **Lara Vaccari**, kiu prenis la iniciaton sendi la agendon de LBV al la provlaboristoj ĉe UN, en Novjorko (entute 250 el pluraj naciecoj). Same faris la profesiulo pri publikaj rilatoj **Igor Gomes**, kiu diskonigis la novaĵon al gazetaro en kvar usonaj ŝtatoj.

## Eksponkunsido "De konsciiĝo al agado"

Protekti Amazonan Arbaron estas la ĉefa brazila devo kontraŭ la pliintensigo de tutmonda varmiĝo. Tial Legio de Bona Volo okazigis la 3-an de julio rilatteman kunsidon kadre de la programo de la Kunsido de Supera Instanco de Ecosoc nomata: "De konsciiĝo al agado: brazilaj strategioj por protekti naturmedion kaj Amazonion".



Prelegantoj de la kunsido, organizata de LBV, dum intervjuo al Mônica Villela (blanke vestita) el UN-Radio, kiu parolis pri brazilaj strategioj por protekti naturmedion kaj Amazonion.

Partoprenis en la diskutrondo Danilo Parmegiani, de LBV; federala deputito **Beto Albuquerque**; senatano **Jefferson Praia** kaj ministrino **Maria Teresa Mesquita Pessoa**, reprezentante la Brazilan Delegitaron ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Oni reliefe diskonigis la kunsidon per UN-Radio, per TTT-ejo de Unuiĝintaj Nacioj kaj per pliaj 50 partneraj radiostacioj, kiuj elsendas siajn programojn al ok portugalparolantaj landoj.



Charles de Lima

Beto Alburquerque ĝojis pro la sukcesaj atingoj en Brazilo: *"Dum tiu jaro kaj duono de enlanda aplikado de tiu leĝo, kiu starigis mastrumadon por publikaj arbaroj en Brazilo, ni tre firme progresis cele kontraŭbatali senarbarigon. Ni mezure registras ĉiun palmolarĝon de publika arbaro; jam estas registritaj 210 milionoj da hektaroj. LBV, tie ĉi en UN, estas nia enirpordo. Pere de ĝi ni venas montri al la cetera mondo ĉiujn bonajn aferojn, kiujn ni faras, kaj ankaŭ niajn malfacilaĵojn".*

Post ĉeesti la kunsidon, la deputito **Charles Roberto de Lima** deklaris: *"Mi volas saluti nian grandan Paiva Netto, kiu entreprenadas senlacan laboron kiel gvidanto de Legio de Bona Volo. Tiu ĉi estas evento ene de Unuiĝintaj Nacioj, en kiu Brazilo partoprenas pere de LBV; nepras, ke la mondo sciu kion ni faras en Brazilo. LBV ja meritas ricevi gratulojn de mi mem kaj de ĉiuj ĉi-tieaj ĉeestantoj. Kiam ĝi proponas, ke ni agadu naturmedie, kaj invitas enlandajn kaj alilandajn aŭtoritatulojn partopreni en tia debato, ĝi esence kontribuas por la vivo-plibonigo de homoj en tiu ĉi Planedo. Pluan fojon mi gratulas nian grandan Paiva Netto pro la laboro de LBV, en la tuta mondo kaj en Brazilo, kiu helpas homojn, infanojn malpli favoratajn, kaj plenumas projekton, kiu bonfaras al ĉiuj".*



Ambasadoro de Madagaskaro **Sina Adrianarivelo** kaj Conceição Albuquerque en la ministreja kunsido de Unesco.

Ankaŭ la politika sciencisto **Paulo Krame**, profesoro ĉe Universitato de Braziljo (UnB), taksis la debaton: *"Post aŭskulti la eksponantojn en tiu ĉi kunsido tiel lerte organizita de LBV, mi multe lernis kaj tio ekde nun pliriĉigos miajn lecionojn, prelegojn, lekciojn kaj artikolojn, kaj havigos al mi plian motivon bone paroli pri Legio de Bona Volo kien ajn mi iros. (...) Paiva Netto estas internacinivela komunikanto! Mi havis la okazon konatiĝi kun kelkaj tiaj homoj kaj akompani, per studado aŭ legado, la vivon de multaj aliaj tutmondaj gvidantoj kaj, laŭ mi, Paiva Netto estas tutmonda eminenta ĉampiono pri komunikado".*



Paulo Kramer

Revene al Brazilo, la senatano Jefferson Praia legis, dum plena kunsido en la Nacia Parlamentejo, en Braziljo/DF, la diskurson de li faritan en la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj. Al la parlamentanoj li asertis: *"Mi volas vortigi al tiu ĉi majesta domo mian paroladon prezentitan en kunsido, kiun mi ĉeestis en Novjorko, pri memsubtena elvolviĝo, organizita de LBV kiel kontribuo al la Kunsido de Supera Instanco 2008. Mi ŝatus vortigi mian dankemon al LBV, kiu estas gvidata de José de Paiva Netto".* ■





Jefferson Praia

## Parolado de LBV al Ŝtatestroj en UN



Legu ĉi-sube pecon el la parolado de la reprezentanto de Legio de Bona Volo en UN, Danilo Parmegiani, direktata al Ŝtatestroj en la privata Ĉambro de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Unuiĝintaj Nacioj, nome *Ecosoc Ĉamber.*

"La rekomendoj de LBV baziĝas sur tri kolonoj, kiujn ni uzas en niaj lernejoj, Komunumaj kaj Klerecaj Centroj, programoj kaj projektoj en sep landoj, cele plivastigi tiun ĉi kolektivan konsciiĝon:

"**Edukado**: Disvolviĝo de strategioj por eduki kaj reeduki homojn, ĉefe infanojn, per instruado de tio, ke *'Ami la Teron estas protekti la estontecon'*. Havigi profesiigon al gejunuloj kaj plenaĝuloj cele al respondeca utiligado de naturaj rimedoj kaj al kreado de enspezorimedoj per recikligitaj produktoj.

"**Komunikado**: Okazigo de Kampanjoj pri konsciigo ĉe la publiko. La devizo de LBV: *'La detruo de la Naturo estas la estingo de la Homa Raso'*, kreita de la direktoro-prezidanto de la Institucio, José de Paiva Netto, ĉiutage atingas milionojn da homoj per televido, radio, interreto kaj gazetaro, krom estigi publikajn aktivadojn kiel pritemaj forumoj, surstrataj marŝoj kaj kulturedukaj programoj.

"**Reto**: Mobilizo de intersektora kunlaborado. Pere de tiu Reto por Solidara Socio, LBV kunigas centojn da civilsociaj organizoj, universitatojn, privatan sektoron, amaskomunikilojn kaj lokajn aŭtoritatojn por interŝanĝi informojn kaj plifirmigi kunlaboradon favore al homaj rajtoj kaj daŭripoveco.

"Laste, mi ŝatus rekomendi, kiel fonton por pliaj informoj, la legadon de la deklaro de LBV kun la simbolo E/2008/NGO/16 kaj ankaŭ de la revuo *Tutmondigo de la Frata Amo* — disponebla en la budo de LBV, en la Foiro pri Novaĵoj de Ecosoc, sur la unua etaĝo, el kiu mi citas jenan resumon de Paiva Netto pri la nepra unuiĝo de la Popoloj. Li diras: *'Aŭ oni integras aŭ oni malintegras'*".





Tiu ĉi parolado estas resumo de la dokumento de LBV, tradukita de UN al siaj ses oficialaj lingvoj. Por legi ĝin vizitu la retejon <documents.un.org> kaj serĉu la simbolon E/2008/MGO/16.

# Feliĉpromesoj de la Prediko sur la Monto de Jesuo



**(Evangelio de la Ekumena Kristo, laŭ Mateo, 5: 1 ĝis 12 per la belega maniero kiel Alziro Zarur eldiradis ĝin)**

*"Jesuo vidinte la homamasojn supereniris sur la monton, kaj kiam Li sidiĝis, Liaj disĉiploj venis al Li; kaj Jesuo instruis, dirante":*

Feliĉaj estas la simplaj en Spirito, ĉar ilia estas la Regno de la Ĉielo.

Feliĉaj estas la plorantaj, ĉar ili estos konsolataj de Dio mem.

Feliĉaj estas la paciencaj, ĉar ili heredos la Teron.

Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas Justecon, ĉar ili estos subtenataj de la Dia Justeco.

Feliĉaj estas la kompatemaj, ĉar ili ricevos kompaton.

Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidos Dion vizaĝo kontraŭ vizaĝo.

Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj.

Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutataj pro Vero, ĉar ilia estas la Regno de la Ĉielo.

Feliĉaj estas vi, kiam oni vin riproĉos kaj persekutos kaj false vin akuzos pro Mi. Ĝoju kaj raviĝu, ĉar via rekompenco estos granda en la Ĉielo, ĉar tiel oni persekutis la Profetojn, kiuj estis antaŭ vi.




www.riotokio.com.br
www.hondanarita.com.br
Rio Tókio, Narita e Honda:
uma legião formada para realizar
a sua vontade de ter um Honda.
NEW CIVIC
Líder de vendas e vencedor do prêmio "Os Eleitos" da Revista 4 Rodas como melhor veículo entre todas as categorias.
Os eleitos
QUATRO RODAS
O ELEITO
Conheça toda linha 0km no maior grupo Honda do Rio e receba o melhor atendimento.
Accord
CR-V
NEW FIT
PROGRAMA Honda Conduz
(IPI E ICMS RJ E SP) CLIENTE ESPECIAL, ENTRE EM CONTATO COM NOSSOS VENDEDORES E AGENDE UMA VISITA.
RIO TÓKIO: 2122-4937 / 2323-9018 - SR. LANDY E SRA. DAISY
NARITA: 3987-8871 - SR. SIDNEY
ATENDEMOS CONVÊNIOS.
Consórcio Nacional Honda
TOTALMENTE SEM JUROS - ENTREGA GARANTIDA PELA FÁBRICA - MENOR TAXA DE ADMINISTRAÇÃO DO PAÍS - MAIOR CONSÓRCIO DA AMÉRICA LATINA COM MAIS DE 1,5 MILHÕES DE CLIENTES ATIVOS RESULTADOS DAS ASSEMBLÉIAS E IMPRESSÃO DO BOLETO DE PAGAMENTO PELA INTERNET.
A MANEIRA MAIS BARATA E INTELIGENTE PARA PROGRAMAR A COMPRA DO SEU NOVO HONDA.
PARCELAS A PARTIR DE: 749,14*
HONDA
Rio Tókio Botafogo
Rua General Severiano, 201
2122-4999
Narita Barra
Av. das Américas, 2001
3987-8888
Rio Tókio Recreio
Av. das Américas, 14.001
2323-9000
O valor de R$749,14 refere-se a 75% da carta de crédito para aquisição do New Fit 1.4 Mecânico 101 cv Flex 2008/2009 com valor de crédito de R$38.883,75.Reservamo-nos o direito de corrigir possíveis erros de digitação. Ofertas válidas até a data da publicação. Fotos meramente ilustrativas.
unlike